

## 世界语基础速成讲座 第九讲

无主句  
感叹句  
原因状语从句  
条件状语从句  
让步状语从句  
结果状语从句

### 感叹句：

世界语感叹句主要用 *Kia, kiel* 引导。

如: *Li estas saĝa. - Kiel saĝa li estas!*

*Li lernas tre rapide. - Kiel rapide li lernas.*

*Ŝi estas bona lernantino.*

- *Kiel bona lernantino ŝi estas!*

- *Kia bona lernantino ŝi estas!*

后一句的 *kia* 修饰名词 *lernantino*，而与形容词 *bona* 没有关系。

### 翻译练习：

兔子跑得真慢！ *kuniklo* 兔子

小猫真可爱！ *aminda* 可爱

看他是个什么样的孩子！ (用 *Kia*)

### 无主句：

世界语中表示天气等自然变化的句子，不加主语。

如: *Estas varme!* 注意，不用形容词。

*Ventas. Pluvas* 等。

英语在同样的情况下会用形式主语 *it*，而世界语不需要。

### 翻译练习：

下过雨了。 *pluvo* 雨

要下雪了。 *neĝo* 雪

冷死了！ *varma* 热

### 原因状语从句和目的状语从句：

*por* 意思是“为了”表示目的。

后接名词和动词不定式。也可以与 *ke* 连用，后接从句。

如：

*Mi venis por Esperanto.*

*Mi venis por lerni Esperanton.*

*Mi venis, por ke mi lernu Esperanton.*

*pro* 意为“由于”，表示原因。

它后接名词，不能接动词不定式。也可以与 *tio, ke* 连用后接从句。如：

Mi ne venis pro malsano.  
Mi ne venis pro tio, ke mi malsaniĝis /estis malsana.  
Mi ne venis ĉar mi malsaniĝis /estis malsana.

### 条件状语从句:

世界语的条件状语从句与汉语结构相近。如

Se ne pluvos, mi vizitos vin morgaŭ.

Mi vizitos vin morgaŭ se ne pluvos.

如果不下雨，我明天就去看你。

如果假设的条件不可能发生，从句中的动词就用假定式-us.

如 Se mi estus birdo, mi tuj flugus al vi.

Mi tuj flugus al vi se mi estus birdo.

### 让步状语从句:

kvankam... tamen... 虽然..... 但是.....

这个从句与汉语的结构及用法相似，但注意的是，kvankam,与 tamen 只用一个也可以，不可以与 sed 连用。

如:

Kvankam mi lernis la anglan diligente, tamen mi ne lernis ĝin bone.

Mi lernis la anglan diligente, tamen mi ne lernis ĝin bone.

Kvankam mi lernis la anglan diligente, mi ne lernis ĝin bone.

比较: Mi lernis la anglan diligente, sed mi ne lernis ĝin bone.

结果状语从句: Li kuris tiel rapide, ke mi ne povis kuratingi lin.

佛学读物:

## 1. La Ploranta Simio

### 生词

plori 哭泣

printempo 春天，春季

tempo 时间

tre 很，非常

milito 战争

ĉaro 车，马车

militĉaro 战车

militisto 武士

veturi 行驶

ebena 平坦的

ebenaĵo 平原

kiraso 盔甲

brila 明亮的

suno 太阳

standardo 旗帜

flirti 飘动

milda 温和的

brizo 微风

generalo 大将，将军

rajdi 骑马

teni 拿

glavo 剑

lanco 矛

regno 国家，王国

gvidi 带领

armeo 军队

inspekti 视察

ĉasi 打猎

treni 训练

soldato 士兵

enua 厌倦的  
 palaco 宫殿  
 fama 闻名  
 arko 弓  
 memori 记忆  
 pafarko 弓  
 trafi 打中，击中  
 fidi 信任  
 kuniklo 兔子  
 cervo 鹿  
 animalo 动物  
 fuĝi 逃避  
 terura 恐怖的  
 terurigi 恐吓  
 kaŝi 躲藏  
 sago 箭  
 fojo 次  
 arbo 树  
 pasi 路过，经过  
 preter: 【介】从...旁经过，经过...旁边  
 bruo 噪音，响声  
 branĉo 树枝  
 supro 上面，上部  
 salti 跳跃  
 respekti 尊重，尊敬  
 moki 嘲弄  
 nukso: 坚果，硬壳果；胡桃，核桃  
 ĵeti 扔，抛  
 leciono 课程，教训  
 arkopafisto 射手，弓箭手  
 celi 瞄  
 flanko 旁边，  
 artifiko 技巧  
 flugi 飞  
 aero 天空  
 kaŭzi 引起  
 rido 笑  
 harzardo 巧合，碰巧  
 gardi 看，小心  
 alia 另一个  
 alifoje 再一次  
 eviti 躲避  
 anstataŭe 反而

kapti 抓  
 snufi 嗅  
 rompi 折断  
 peco 块，段，碎片  
 freneza 疯狂的  
 desplie 更加  
 reagi 反应  
 lerta: 熟练的，灵巧的，敏捷的  
 sagaca: 机灵的，机敏的，伶俐的，  
 精明的  
 ŝajni 好像，仿佛  
 kompreni 明白，理解  
 situacio: 地位，位置，处境  
 tuj 马上，立刻  
 ŝiri 撕  
 koro 心，心脏  
 torent-a: 洪流，急流，激流，湍流.....  
 的形容词形式  
 larmo 眼泪  
 vizaĝo 脸  
 mirigi 使惊奇，使吃惊  
 moŝto: 对于任何等级都可用的尊称  
 Via Moŝto 陛下  
 jen 看，瞧  
 levi 抬起来  
 kapo 头  
 enpensiĝi 沉思  
 ĝoja 高兴的  
 kompato 同情  
 estiĝi 产生，生起  
 regi 统治，笼罩  
 demeti 放下  
 armilo 武器  
 halti 停止  
 haltigi 使.....停止  
 plu 进一步  
 ne plu 不再  
 anticipi 提前  
 informi 通知  
 emociiĝi 感动  
 opinii 认为  
 amema 有爱心的  
 labori 工作  
 diligenta 勤奋的

prospera 繁荣的  
potenca 强大的  
cent 百

centoj da 几百  
jaro 年

## 课文

### 1. La Ploranta Simio

Printempon antaŭ tre longa tempo, militĉaroj veturis rapide sur ebenaĵo. La kirasoj de la militistoj brilis sub la suno kaj la standardoj flirtis en milda brizo.

La generaloj rajdis malantaŭe tenante glavon aŭ lancon en la mano, kaj ilin sekvis belega ĉaro, en kiu sidas la granda reĝo de Chu-regno (Ĉu).

Ĉiujare la reĝo gvidis armeon inspekti sian regnon, ĉasi, aŭ trejni la soldatojn, forlasante la enuige malnovan palacon.

La reĝo havis generalon nomatan Yang Youji (Jan joŭĝji), kiu famis pro sia arkopafado. Eĉ en la nuna tempo oni ankoraŭ memoras kiel bone li pafis per pafarko. Li neniam maltrafis. La reĝo tre fidis al li. Dum la ĉasado kunikloj, cervoj kaj ĉiuj aliaj animaloj fuĝis tien kaj reen terurite, tamen nenie ili kapablis sin kaŝi for de la sagoj de Generalo Yang. Se li pafis cent fojojn, li trafis dekoble dek fojojn...

Arbo granda kaj maljuna staris sur la ebenaĵo. Kiam la soldatoj pasis preter ĝi, ili aŭdis bruon kaj vidis simion sur la branĉoj supre. Ĝi saltadis malrespekte, mokadis la ĉasantajn soldatojn kaj eĉ ĵetis nukson al ili.

"Bonege, beluleto! Mi donu al vi lecionon," diris iu arkopafisto dum li celis sian pafarkon al la simio. Sed je lia pafado, la simio sin flankenigis per artifiko, tiel ke la sago flugis sentrafe en la aeron. Tio kaŭzis ridegon el la militistaro.

"Jen hazardo. Gardu la alian!" Li pafis aliffoje, sed la simio ne plu provis eviti la sagon. Anstataŭe, ĝi kaptis la flugantan sagon, snufis malestime kaj rompis en du pecojn.

La soldatoj freneziĝis de kolero. Ili pafadis al ĝi, tamen ĝi reagis sagace kaj lerte. Ĝi kaptadis iliajn sagojn en la aero kaj mokis ilin desplie.

Kiam la reĝo vidis la malestiman simion, li ordonis Generalon Yang pafi ĝin.

La simio ŝajne ekkomprenis la situacion. Tuj kiam Generalo Yang rajdis al la arbo, ĝi ekploris. Ĝi ploris kaj kriis korŝire kun torentaj larmoj sur la vizaĝo.

La reĝo demandis mirigite: "Pro kio la simio ploras?"

Generalo Yang respondis: "Eble ĝi scias, ke miaj sagoj neniam maltrafas. Do kiel lerta kaj sagaca ĝi estas, ĝi ne povos eviti morton pro la ordono de Via Moŝto. Jen kial ĝi ploras."

La reĝo mallevis la kapon kaj enpensiĝis: "Kiel malĝoja estas la simio! Ĉiuj aliaj animaloj suferas same!" Kompato estiĝis kaj regis en la koro de Lia Moŝto. Li ordonis, ke Generalo Yang demetu sian armilon, kaj haltigu la armeon por ke la animaloj ne plu suferu de la ĉasado.

Li anticipe revenis al la ĉefurbo. Oni informiĝis, ke la reĝo emociiĝis de simiaj larmoj. Ĉiuj en la regno sin opiniis feliĉaj sub la regado de tiel bonkora kaj amema reĝo, ili do laboradis despli diligente por sia regno. Ekde tiam Chu-regno estis

prospera kaj potenca dum centoj da jaroj.

kvankam..., tamen...

Mallaborema laboristo

Iu laboristo estis tre mallaborema. Li ofte petis forpermeson de la estro per aliaj laboristoj, por ke li havu ripozon kiel malsanulo. Foje, li ne vizitis la fabrikon dum semajno, kaj la estro ankaŭ ne ricevis ripozpeton de li. La estro maltrankviliĝis pro tio, kio okazis al li, kaj tuj vizitis lin en lia hejmo. Enirinte, la estro trovis, ke la mallaborema laboristo kuŝas sur la lito. Vidinte la estron, la laboristo diris: "Pardonu, mi vere malsaniĝis ĉifoje. Miaj amikoj ne petis forpermeson por mi pro tio, ke mi ne havas forton por iri al ili."